

Numero: 244.
Septembro: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Gepatra ĝojo

Promenante sur la strato tute hazarde mi ekaŭdis la sekvan parolon el la buŝo de patrino. Kun ŝi estis sia ses aŭ sepjara filineto.

La virino ĝoje rakontis al ŝia amikino:

--Imagu kara mia! Mia filineto Manjo lernas la anglan lingvon. Depost kelkaj jaroj ŝi lernas ĉi tiun grandiozan lingvon. Nuntempe ĉiu devas posedi ĉi tiun lingvon. Ĉu ne?

La amikino konsentante kapjesadas kaj kvazaŭ ŝi estus dirinta:

--Prave, oni nepre devas lerni fremdajn lingvojn.

La du virinoj longe babiladis pri la infanĝardena lingvolernado. Dume la etulineto petadis en la lernita lingvo.

Ŝia panjo estis fiera kaj ĉe ĉiu sukcese eldirita vorto aŭ frazeto.

--Bone karulineto, tre bone. Vi jam scias perfekte la anglan lingvon. Se vi plenaĝiĝos vi ne havos lingvajn malfacilaĵojn en la mondo. Vi povos komprenigi vin en ĉiu lando. Vi estas mia karega kolombeto.

La patrino longe flatis al sia filino, kiu estis ege fiera. Dume ankaŭ la alia virino laŭdis ŝian lingvoscion.

Ili ĉiuj estis tre gajaj kaj kontentaj.

Subite apud ili bremsis eksterlanda, granda aŭto. El ĝi viro demandis ion fremdlingve.

La patrino de la knabino tuj diris:

--Kara mia, aŭskultu, kion diras la onklo en la aŭto! Ja vi jam scias la anglan lingvon. Bonvolu traduki al ni.

La knabino unue ruĝiĝis kaj kaŝiĝis en la jupon de sia patrino.

La virino plu kuraĝigis ŝin:

--Koreto mia, ne hontu! Vi lernas la anglan lingvon. Do ek!

La knabino restis en la jupo de la virino. En la aŭto la viro longe atendis. Li plurfoje ripetis la demandon kaj fine li foriris sen saluto.

La du virinoj interrigardis kaj la patrino rimarkis:

--Tiu ĉi aŭtomobilistoj estas tro malpaciencaj. Ĉu li ne povis atendi ĝis mia kara filineto tradukas la demandon. Ankaŭ vi scias, kiom perfekte ŝi parolas la anglan lingvon.

Fine ankaŭ la knabino ekparolis:

--Panjo mia, en la infanĝardeno ni ellernis nur kiel ni nomiĝas angle: MY NOME.

-Redaktanto-



Nesufiĉa lingvoscio

Onidire ni hungaroj apenaŭ scias fremdajn lingvojn. Rilate al aliaj eŭropaj nacioj en Hungario malgraŭ la amasaj lingvokursoj nur kelkaj homoj scias perfekte lingvojn.

Ĉu la mondo konas nian lingvon?

Ne.

Tamen oni anticipas de ni, ke ni sciu almenaŭ la gravajn mondlingvojn por ke ni povu komuniki kun la eksterlandanoj.

Kial tiuj kelkaj lingvoj sidas sur la trono, kiujn ni nepre devas ellerni, se ni deziras komprenigi nin? Kial ne la hungara lingvo estas disvastiĝinta en la tuta mondo? Ĉu la nia ne estas tiom valora kaj uzebla, kiel la nun parolataj mondlingvoj?

Tio radikiĝas en la fora historio. Kiu nur iom konas la historion, tiu scias, kiam la grandaj mondlingvoj komencis disvastiĝi, ni hungaroj estis la ŝildo de Eŭropo eĉ tuta klera mondo.

En Hungario furiozis teruraj bataloj kontraŭ la turkoj kaj la lando disŝiriĝis je tri partoj. Hungara popolo sangis. Dume en la okcidenta parto de Eŭropo la tiel nomataj „grandaj” nacioj ekiris por konkeri la mondon. En Afriko, Azio, eĉ Ameriko estiĝis kolonioj kien estis eksportitaj ilia kulturo kaj lingvo. La koloniistoj perforte subpremis la praloĝantojn, eĉ plej ofte ekstermis ilin. Multajn el ili sklavigis kaj ili estis laborigitaj akirante grandan profiton por la koloniistoj.

Kara Leganto, nun bonvolu ludi per la imago! Kio estus okazinta, se tiam la hungaroj unuiĝus kun la turkoj? Ĉu ankaŭ tiam tiel aspektus la mondmapo? Ĉu tiam la angla lingvo sidus sur la trono kaj nun ĉiu ĝin dezirus ellerni?

Kompreneble en la historio ne ekzistas: Kio estus okazinta? La mondo tiel formiĝis. Multaj pensas, ke la hungara estas malgranda lingvo.

Ni forgesu, ke en la mondo ekzistas grandaj kaj malgrandaj lingvoj! Ĉiu lingvo estas egala. Do, ni ne pensu, ke iu lingvo estas pli grava kaj pli utila ol la nia!

En la mondo estas granda lingvoĥaoso kaj ĝin povus solvi nur sendependa, facile ellernebla helplingvo.

Ni ne ĉagrenu, tiu ĉi lingvo jam estas eltrovita. Ni ne davas cerbumi, kia estu tiu ĉi komunikilo kaj ĝi pruvis sian vivkapablon.

Certe vi jam scias ĝi estas nia amata lingvo: ESPERANTO.

-Ŝaŝa-



Proksimiĝas aŭtuno

La viro enue promenis en la parko. Ĝi estis silenta. Nur kelkaj homoj sidadis sur la benkoj sunumante ĝuante la septembran sunbrilon.

Li haltis antaŭ rozarbusto kaj revante li rigardis la velkiĝantajn florojn. Ankoraŭ kelkaj pompis, kvazaŭ estus somero. Sed jam vidiĝis ankoraŭ kelke da tagoj kaj tiu ĉi beleco kaj ĉarmo forflugos. Inter la branĉoj jam estis kelkaj sekaj folietoj falintaj, kaj kiel la unua signo avertas la preteriranton pri la forpaso.

Li enflaris en iu proksima rozo. Ĝiaodoro estis narkota. La viro malfermis siajn okulojn kaj en lia kapo malnovaj bildoj ekaperis.

Li estis ankoraŭ junulo kaj same li promenis en flora parko kiel nun. Sed kun li estis belega junulino kaj ili iris brako en la brako. Ĉiu admiris kaj enviis ilin.

Malofte estas videbla tiom belega paro, kiel ili estis.

Ho, kiom rapide forflugis tiuj feliĉaj jaroj. Jam nur ili estas memoro. Memoro, kion oni neniam povas forgesi.



Kial forpasas, kio estas bela kaj bona? Kiu scias je tio la respondon?

Vane serĉi la kialon. Homa vivo ne sufiĉas ekscii la veron.

Ni ĝuu la belecon de la vivo! Admiru la stelaron sur la nokta firmamento! Tie ĉi racio ne helpas. Tiuj ĉi sentoj akompanas vin dum via tuta vivo.

Li iris plu en la parko kaj ĝuis la mildan, varmetan karesadon de la sunbrilo. Sub lia plado seka folio susuris, kvazaŭ homo esplorintus.

Jes, proksimiĝas aŭtuno kaj poste la frosta vintro.

Iam ĉio forpasos kaj restos por ni nur granda, blanka nenio.

-Apáti Kovács Béla-



Pri imaga vojaĝo

**-Fantasta rakonto-
II.**

Mi balbutis ion. Eble tion, ke ankaŭ mi salutas lin. Certe mi ŝajnis ege ridinda, ĉar li amikeme alpaŝis min kaj diris:

--Ne timu! Sur la ferdeko vi estas gasto mia. Vi ne estas malliberulo. Vi povas iri kien ajn.

Mi ne komprenis, kio estas tiu ĉi granda amikeco kaj gastamo. Fine kolektante mian restintan kuraĝon mi demandis:

--Kial mi estas tie ĉi? Sur la ferdeko mi komprenas nenion. Mi estas fremdulo. Kien ni ŝipveturas?


Mia gastiganto denove ekridetis:

--Ĝustatempe vi ekscios ĉion. Ne maltrankviliĝu! Nun mi deziras prezentiĝi al vi. Mia nomo estas barono Fernando Bonfarulo. Mi havas insulon sendependa de ĉiu ŝtato kaj lando en la Pacifika oceano. Ĝin ne serĉu sur la mapo, ĉar ĉi insulo estas artefarita! Miaj inĝenieroj kaj esploristoj konstruis ĝin. Se estas necesa, tiam ĝin ni povas submarigi kaj ĝi malaperas de antaŭ la okuloj de la mondo. Krome per speciala tekniko ni povas aliigi la lokon de la insulo.

Unue mi pensis tiu ĉi ulo estas stulta kaj mi nun estas en liaj ungegoj. Senĉese mi cerbumis pri tio, kiel liberiĝi el tiu ĉi malagrabra situacio.

Li ankoraŭ longe parolis pri la insulo. Por mi ĝi estis neimagebla. Li certe estas freneza. Estus bone serĉi la ŝipestron kaj paroli kun li pri mia estonto. Eble li ne scias, ke mi estas sur la ferdeko.

Mi plu aŭskultis lin kaj mi atendis, ke io okazu kaj mi povu liberiĝi.



--Certe vi malsatiĝis – li diris afable – mi invitas vin al mia tablo por vespermanĝi. Almenaŭ mi prezentos vin al miaj geamikoj, kiuj veturas kun ni en la ŝipo.

Verdire mi estis jam tre malsata kaj volonte akceptis la inviton. Krome mi esperis, dum la vespermanĝo pri multaj sekretoj mi ricevos respondon.

Mi ekiris kun la barono al la manĝosalono kaj mi ekscitite atendis, kio okazos.

(daŭrigota)

Poezio

Friedrich Wilhelm Ellersiek

ELLERSIEK, Friedrich Wilhelm. (pseŭdonime Argus, Eko k.a.) 1880-1959. Germano; eldonisto kaj redaktoro. Naskiĝis en Calvörde. Esperantisto de 1907. Ĉefe Esperanta eldonisto de 1909. Redaktoro de "Germana Esperantisto" kaj "Esperanta Praktiko". Ano de la Lingva Komitato. Ĉefo de vojaĝoficejo; uzis Esperanton por aranĝi karavanojn al UK. Publikigis multajn originalajn artikolojn, tradukaĵojn, "babiladojn" en siaj gazetoj.

Ellersiek, - la Praktikon gvidas
Kaj krome ankaŭ karavanon
Plej ame vartas ĉiun anon
Kiu nur sin al li konfidas

Krom ŝercoj, kiujn ĉiu ridas
Prizorgas trajnon, loĝon, panon
Ellersiek, - la Praktikon gvidas
Kaj krome ankaŭ karavanon

Kaj se li fine hejme sidas
Li plumon kaptas en la manon
Verkis eĉ detektiv-romanon
Sed pst, sekreton mi perfidas...

Ellersiek, - la Praktikon gvidas.
/ Kálmán Kalocsay, Rimportretoj.

Verko (sub pseŭdonimo Argus):
Pro kio? (krimromano, 1920)

/Enciklopedio de Esperanto, 1934
/Courtinat: Historio de Esperanto, 1964



Poezio

La venkonto

Malsupren klinu vin; aŭskultu tie,
kiel la herbo ridas ironie
je nia febla, vana kontraŭstaro
al ĝia vastiĝanta akaparo.

En mondo griza, nuda kaj inerta
naskiĝis ĝi, etaĵo magra, verda.
Ne havis ŝajne ĝi ekzistkialon;
ĝi tamen al si juris, la batalon
senlace kontraŭ tiu mondo teni,
por ĉion sub la herboregon preni.

Do rampe etendiĝis ĝia sfero,
kaj pli kaj pli verdiĝis nia tero,
ĝis ĉiu kontinento kaj insulo
dronis sub la malsata herbrampulo.

Tapiŝon sternis ĝi por la piedo
de ĉio viva sur la Ter-planedo:
kovrilon faris ĝi funebre pompan
por tegi ĉiun ripozejon tombran.

De temp' al tempo homoj ĝin detruas
kaj sur la vaka grundo ekkonstruas
domon aŭ urbon, templon aŭ palacon,
per forto konkerante iun spacon:
kaj birdoj en la ĉielalto vidas,
ke en la verdo griza skvamo sidas.

Sed dense ĉe la urborando kuŝas
la herbolim': sin reciproke tuŝas
tie la homa mond' kaj la masiva
forto de la Naturo primitiva.

Nur la frotpremo de la hompiedoj
malhelpas la eniron de pikadoj
de l'verda malamiko, kiu staras
ĉirkaŭ la muroj, kiuj vojon baras.

Sed iam malpliigoŝ la piedoj:
al la verdulo venos venkrimedoj.
Disfalos brikoj, ruiniĝos domoj,
kaj el la urbruin' formortos homoj
La urb' iama sian lokon cedos,
kaj ĝin la herb' por ĉiam reposedos.

Malsupren klinu vin: aŭskultu tie,
kiel la herbo ridas ironie...
Sonas de horizont' al horizonto
la rido de la verda mondvenconto.

John S. Dinwoodie

Por infanoj

Malfeliĉa cikonio

En nia vilaĝo la cikonio ĉiam estis ŝatata birdo. Ĝi nestis sur la fumtuboj de la domoj. Onidire, kie estas cikonio, tie vivas bonaj homoj. Tial la vilaĝanoj estimis la cikoniojn.

Ni, infanoj, ĝue rigardis la cikonionestojn kaj ni kaŝobservis, kiel la cikonidoj lernadis la flugon. La gepatroj zorgoplene instruis ilin.

Komence ili estis mallertaj, sed kiel pasis la tagoj la cikonidoj tiel fariĝis pli spertaj kaj en iu tago ili povis flugi kun la aliaj cikonioj.



Fine de aŭgusto ili kolektiĝis ĉe la vilaĝfino kaj kiam alvenis la momento ili ekflugis al Afriko kaj ili nur printempe revenis al sia naskiĝlando.

Tiel okazas tiu ĉi jam de jarcentoj. Ĉiuprintempe ni malpacience atendis la cikoniojn, kiel bonajn geamikojn. Ja ili estis niaj geamikoj, ĉar multajn el ili ni konis laŭ nomo. Ni donis nomon al niaj karegaj cikonioj.

Proksime al nia domo sur la najbara kamentubo nestis Karlo kun sia familio.



La cikonio familio havis kvar idojn. La gepatroj diligente portadis por ili la nutraĵon kaj la etuloj bele kreskis. Se la gepatroj ne estis for la malgrandaj cikonioinfanoj ekzercadis la flugadon. Ĝis aŭtuno ili perfekte ellernis tiun ĉi scienccon. Ili ĉiuj estis pretaj flugi al Afriko.

Sed en la lasta tago okazis fatala akcidento. Dio scias kiel unu el la idoj alflugis la elektran draton kaj ĝi vundiĝante terenfalas.

La malfeliĉulo ne povis flugi kun siaj fratoj kaj gepatroj.

Ni infanoj vidis tiun ĉi teruran akcidenton.

Kion fari nun? – ni cerbumis – Kiel helpi al la cikonio?

Ni sciis kaj vidis, ke tiu ĉi malfeliĉa birdo jam ne povas flugi kun siaj familianoj suden. Se oni ne helpas al ĝi, tiam vintre ĝi frostmortos.

Ni decidis, ke savos la vivon de la malfeliĉa cikonio. Verdire la plenaĝuloj proponis injekti ĝin por ke ĝi ne suferu kaj ĝi fordormu.

Al ni ne plaĉis la ideo murdi ĝin. Fine sukcesis atingi, ke almenaŭ ni ekprovu savi ĝian vivon. Estis homoj kiuj priridis nin kaj diris: la cikonio ne vivos plu ol kelkajn semajnojn, ĉar ankaŭ ĝiaj flugiloj rompiĝis.

Dank' al Dio, la vilaĝa bestokuracisto helpis. Iom sukcesis fiksi la flugilojn.

La sekva demando estis tio, kion doni al la malsata birdo. Kapti ranojn aŭtune jam estis malfacila kaj ne ĉiam sukcesis. Bonŝance nia amiko havis bonan apetiton kaj ĝi volonte manĝis ankaŭ viandopecetojn kaj similajn, kiuj ne estis bezonataj en la kuirejo.

La dubantoj ne pravis. La vundiĝinta cikonio rapide resaniĝis kaj fortiĝis.

Ni trovis por li bonan lokon en la iama bovinostalo, eĉ vintre ĝi ne malvarmis.

Ĝi ege bonfartis kun siaj novaj familianoj. Tiu ĉi kara besto fariĝis nia amiko.

La tagoj, semajnoj, monatoj rapide pasis. En iu tago komencis degeli la neĝo kaj la tagoj plilongiĝis. Suno varme komencis brili.

Nia cikonio de tago al tago iĝis pli ekscitita. Kvazaŭ ĝi estus sentinta ion.



Ĝi jam ne ŝatis esti en la bovinostalo. Ĝi konstante serĉis la eblon por liberiĝi, kaj kiam ĝi ekaŭdis la bruon de la cikonioj alvenantaj el Afriko, ĝin ni jam ne povis reteni. Ĝin ni liberigis kaj antaŭ ĝi larĝe malfermis la pordon.

Feliĉe ĝi elkuregis kaj flugis supren al sia gepatra nesto, kie ĝin jam atendis la aliaj cikonioj.

Iomete malgaje ni rigardis ĝin, kial senadiaŭo ĝi forlasis siajn savantojn.

Fine ni komprenis, tiel estis bone, ja ĝia hejmo estas sur la kamentubo kun siaj karuloj.

-Onklo Adalberto-

Aŭtunaj bildoj



Aŭtunaj bildoj

